EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

EKO 2023 / 49  Aŭgusto 24, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.

Pezo:  Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390  KB. Alk: 382, Sume: 812 KB

temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

## Invito al Aruŝa kaj Afriko

La tutmonda, viva aspekto de la plej prestiĝa Esperanto-renkontiĝo en Esperantujo esprimiĝis ankoraŭ ĉi-jare en Torino, kadre de la 108-a Universala Kongreso, per partopreno de homoj el ĉiuj kontinentoj. Afriko aparte estis reprezentita per aktivuloj el Angolo, Benino, Burundo, Madagaskaro, Niĝerio, Tanzanio kaj Togolando. Temis pri senprecedenca nombro de afrikaj partoprenantoj.

Ĝenerale estis bonegaj impresoj pri la renkontiĝo kaj pri la gastiganta urbo Torino. Gratulojn al ĉiuj entoj, kiuj kunlaboris pri la sukcesa aranĝo kaj dankon al ĉiuj partoprenintoj. Multnombre kongresanoj venis ĉeesti la oficialan prezenton de John Magessa pri la venontjara Universala Kongreso, la unua en Afriko! Leviĝis oportune demandoj kaj venis kontentigaj respondoj jen de la LKK, jen de la Kongresa fako de UEA, jen de homoj alikontinentaj, kiuj iam vizitis Afrikon. Espereble, ĉio estis nun sufiĉe klara (kompreneble oni povas ankoraŭ, skribi, demandi, se oni bezonas pli da klarigoj)! Jam ne plu estas kialo por ne vojaĝi al Afriko. En Aruŝo ekzistas ĉiuj servoj, kiujn oni trovas en ĉiuj grandaj urboj: diversaj hoteloj, busoj, ATM-aŭtomatoj, polico, bankoj, apotekoj, malsanulejoj ktp. Kaj plia bona novaĵo: por alikontinentanoj ne estas devigo havi vakcinon por eniri Tanzanion! Bonvolu jam nun komenci plani vian vojaĝon al la 109-a UK. Aruŝo ĝojas bonvenigi vin ĉiujn por spertigi vin pri la bunteco kaj riĉeco de Tanzanio, la hejmo de gravaj mirindaĵoj.
Tie la LKK preparas por vi agrable neforgeseblan kongreson en 2024. La kongresa temo estas: 'Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo'. Bonvolu konsideri…kaj nun aliĝi al la 109-a Universala Kongreso por ĝui la plej favorprezan aliĝperiodon! ĉe https://uk.esperanto.net/2024/

Adje Adjevi

**PS:** *SMG poste aperigos praktikajn informojn pri Tanzanio. Pro la partopreno en la 6-a afrika kongreso, li en 2016 esploris multon. Necesos nur rekontroli la informojn, kaj aktualigi ilin.*

## Balkana kunlaboro

Partoprenis 22 personoj en la regula retkunsido de la balkana kolektivo. La plimulto venis el Serbio, sed estis krome partoprenantoj el Albanio (unu veterano, unu aktiva junulo), Bosnio-Hercegovino (la kunvokinto), Britio, Hungario, Kroatio kaj Rumanio. Kiel kutime, unu membro antaŭpreparas prezentaĵon. Ĉi-foje temis pri Josip Pleadin el la nord-kroata urbo  Đurđevac, kie li prizorgas Dokumentan Esperanto-Centron (DEC). Li informis ke li lastatempe eldonis kvar librojn. DEC komence de julio prizorgis la  landan kongreson, dum kiu Kroata Esperanto-Ligo komisiis al DEC organizadon de landaj kongresoj dum la sekvaj kvin jaroj. Ŝrumpis la nombro de Eo-societoj. DEC laboras por pretigi migrantan ekspozicion pri Esperanto, kiu cirkulos tra la lando kaj regule prezentos Esperanton al la publiko. Kiel loko de landa kongreso en 2024 estis anoncita la regiono apud Šibenik ĉe la adriatika marbordo. Pleadin menciis la projektojn Erasmus++, kiuj tre ofte revenis al la diskuto, ĉar pluraj regionaj organizaĵoj jam uzas tiujn projektojn. Ĉefe, per EU-subteno du serbaj junuloj povis vojaĝi al la IJK en Italio kaj du muzik-instruistoj al la samloka ILEI-kongreso. Du en la kvaropo. (Vuko kaj Blanka) prezentis bildan raporton pri tiu sukceso. En la planoj estas subvenciota trejna seminario pri interkulturo, kun atelieroj kaj lingvo-festivalo okazonta en aŭgusto 2024 kun la eblo de fizika kunvenigo de balkananoj; la projekta peto al Erasmus++ venos el Serbio – aktivas en tio Radojica Petroviĉ, estrarano de ILEI. Juri, la junulo el Albanio, aktivas pri Esperanto en Fejsbuko. En Bosnio-Hercegovino ekaktivas nova estraro kun novaj planoj, kiel jam raportite en EKO-komuniko.

Protokolis: SMG kun helpo de Josip Pleadin

## Trezorejo de Torinaj Kongresaj Kurieroj

Ĉiuj kongresaj kurieroj troviĝas en https://uea.org/pdf/uk2023/

## Raporto de Afrika Komisiono de UEA dum UK


Dum la UK en Torino, okazis prezentado pri Regionaj komisionoj. La Kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA (AK) prezentis la agadojn de AK kaj daŭripovajn projektojn. Ni jam vidis multajn ŝanĝojn; kelkaj niaj novaj Landaj Asocioj aperis:

- La asocio de junaj senegalaj esperantistoj (SEJ) estis aprobita en januaro 2023.
- Esperanto-kursoj okazas interrete en Burundo, Tanzanio, DR Kongo, Zambio, Senegalo, Mozambiko.
- Organizado de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en Senegalo.
- Starigo de la retradio, kiu elsendos programojn en Esperanto.
- La partopreno de tri anoj de la afrika komisiono en la 108-a UK en Torino,
- Aprobo de la 10 plej bonaj projektoj kadre de la projekto NI SEMAS.

La Afrika Komisiono identigis 31 bonajn instruistojn en Afriko (Burundo, Tanzanio, Madagaskaro, Togolando, Kongo DR kaj Ganao), kiuj helpu en la instru-kampanjo. Ni deziras atingi multajn el la kurso-partoprenantoj, sed ni volas ankaŭ, ke ĉiuj landoj tra la tuta Kongreso povu regi la lingvon kaj bone uzi ĝin en komunikado.

Afrika Retradio havas sloganon: la Voĉo de Afriko tra la mondo. La retejo de la Afrika retradio estas: https://afrikaretradio.com

Dum la UK, du membroj de la AK trapasis KER-ekzamenon kaj ni atendas la rezultojn! Du el la membroj de AK ricevis premiojn!



## Ni kursas kaj kursas senfine…

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Eo-kurso por komencantoj (Sesio 1)
Gvidantonomo: Adam Brooking
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Bruselo, Belgio.
Aldoninto: Nikolao

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27546

------------------

Nomo: Club Espéranto Le Beausset
Gvidantonomo: LAFITTE Nicole
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Le Beausset, Francio.
Aldoninto: mirann

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27543

----------------

Nomo: Reta paroliga kurso
Gvidantonomo: Paul Quevy-Lefevre
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Les Petites Loges, Francio.
Aldoninto: Paul51

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27544

----------------

Nomo: Kurso por komencantoj
Gvidantonomo: Silvio Curtis
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Monteverde Kostariko
Aldoninto: Silvio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27548

## AMO 102 videbla per karambolo!

Vidu la tutan enhavon de AMO 102 en formato mp4 pere de la apo <Smash>. Esperante: <Karambolo>. La sumo de naŭ dokumentoj estas 673 MB, sed kredeble eblas spekti ilin sen balasti vian propran komputilon. Mi mem tro maljunas por alŝuti la programon 'Karambolo'. Sed homoj naskiĝintaj en postaj teknologiaj epokoj: se vi volas, kontaktu min kaj mi sendos al vi la itallingvan gvidilon pri 'Smash', kiun mi ricevis de Laura Brazzabeni, la estraranino en ILEI pri kongresoj.

## Eŭropaj agantoj

Bonvolu kunlabori kun la eŭropa komisiono de UEA/EEU/EDE, kiuj komencas startigi siajn planojn por la venonta labor-jaro laŭ tri eroj: - informado pri esperanto al neesperantistoj, - instruado al komencantoj, -utiligado de esperanto, kaj por komenci bonvolu nur aliĝi al la listo europaj-aktivuloj-por-esperanto@groups.io per simpla senteksta mesaĝo al europaj-aktivuloj-por-esperanto+subscribe@groups.io

SMG: EEU estas la Eŭropa Esperanto-Unio. EDE estas la asocio por Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

## Nova klubo en la ĉefurbo de Burundo

Cele al la bona preparo de la 109 UK-kongreso en Tanzanio mi prenis la iniciaton malfermi novan klubon en la urbo Buĵumburo. La klubo, nomata 'Paca Armeo'. kiu havas entute 55 junaj universitatajn burundajn. Kursoj estas instruataj en klaso dum trimonata periodo. Ni volas montri ankaŭ, ke Burundo konservas sian unuan lokon kiel gvidanto en Afriko kun la plej granda nombro da esperantistoj.

Kurso gvidanto: Aimé Patrick Manirakiza, kunordiganto de AK




## Savu la kamelon!

Alkroĉite estas la bildo, kiu aperis en la fino de kajero 2 de la lernolibro 'Savu la kamelon'. Legu en la paĝo viajn taskojn kaj helpilojn. Jen plia instru-helpilo.

## Jen plia artikolo en facila Esperanto

https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/adoleskeco-r382/

============== vortoj: 1142 =============

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.